



NEDERLANDA ESPERANTISTO

*Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
"La Estonto Estas Nia"*

30-a jaro; n-ro 2-a. Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

PRI MUZIKO IAM PROSPERANTA, NUN ANTIKVAFORMA*).

Kiam Japanujo malfermis sian pordon al la okcidenta civilizacio, okcidenta muziko estis enkondukita en ĉi tiun landon kaj gajnis popularecon inter la japana popolo.

Dum jarcento ĝi disvastiĝis kaj ĝis hodiaŭ, tiel ke nun ĉiu - juna aŭ maljuna, riĉa aŭ malriĉa - havas kontakton kun okcidentstila muziko en la ĉiutaga vivo. Ankaŭ en la elementa lernejo la lernantoj konatiĝas kun tiuspeca muziko. La tradiciaj artoj suferas pro la ŝanĝoj en siaj formoj kaj tekniko. Kelkaj el ili jam devojiĝis dum jarcentoj kaj kelkaj estas konservitaj de entuziasmaj personoj kaj de la aŭtoritatoj.

La japana tradicia muziko ne originas en Japanujo, sed ĝi estas enkondukita el aliaj landoj antaŭ mil jaroj. Japanoj ellernis la muzikon alportitan el Ĉinio kaj Koreujo, plibonigante instrumentojn kaj teknikojn. Tradiciaj instrumentoj estas i.a. samiseno, kotoo, fue, kaj ŝakuhaĉo. Tradiciaj muzikformoj estas: nagaŭta, kijomoto, gidaju, jokjoku kaj gagaku.

Verdire junaj personoj ne plu amas muzikon, ludatan en japana stilo.

Ni nun pritraktas kelkajn aspektojn de la japana tradicia muziko.

MINJOO (POPOLKANTO). La primitivaj kantoj estis de fiŝkaptistoj kaj terkulturistoj. Multaj improvizis kantojn en la vivo. La plej bonaj el ili estis transportitaj trans generaciojn. Kantoj laŭgrade disvastiĝis en proksima regiono kaj poste

pli malproksimen. Dank' al la apero de radio popolkantoj estis ekkonigitaj tra la tuta lando.

Ĝis la okcidenta civilizacio atingis Japanujon, japanoj ne havis muziknotojn por skribi la melodiojn de popolkantoj. Tial ili estis transdonitaj de buŝo al orelo.

Kompare kun la okcidentstila muziko la japana popolkanto estas simpla en sia kompono. En okcidentaj popolkantoj ekzemple troviĝas diversaj taktaj, kiel 2-, 4- kaj 6-pulsaj taktaj. Sed kantoj de 3-a aŭ 6-pulsaj taktaj estas tre maloftaj en la japanaj popolkantoj. Preskaŭ ĉiuj japanaj popolkantoj estas komponitaj en monotona ritmaj kaj melodiaj formoj.

Multaj estas komponitaj per malpli ol kvin gamoj en unu oktavo. Ili havas mallongan melodian frazon.

Samiseno estas nepre necesa instrumento por kelkaj japanaj kantoj.

Ĝi estas alte taksita pro ĝia melodia beleco. Lastatempe ĝi estis multe ŝanĝita, ĉar novaj popolkantoj estas komponitaj kun longaj melodioj kaj kompleksaj taktaj. Unuvorte: la popolkantoj alproksimiĝas al la okcidenta muziko en siaj formoj.

SAMISENO. La tradicia samiseno estas korda instrumento, kiu havas tri kordojn kaj similas al banjo. Samiseno estas laŭdire antaŭ 4 mil jaroj inventita en Egiptujo. Ĝi venis al Japanujo tra Hindujo kaj Ĉinujo. En tiuj tempoj ĝi estis farita

Nia Jubilea Kongreso.

Ĉar L.E.E.N. fondiĝis en aŭgusto 1905, ni ĉi tiun jaron festos la 60-jaran ekzistadon de nia asocio.

La estraro decidis organizi kongreson je tiu okazo kaj komisiis al malgranda komitato aranĝi ĝin.

En la januara numero de N.E. vi jam legis mallongan informon, sed nun ni povas sciigi al vi iom pli.

el ligno kaj haŭto de serpento, kaj estis ludita per plektrono, farita el korno. Poste oni komencis uzi haŭton de katoj anstataŭ tiun de serpentoj. Krome oni plibonigis la plektron.

Dum la Tokugawa-periodo (17-a jarcento) virtuloj de samiseno aperis unu post la alia. Samiseno estis uzita por akompani kantojn de tiuj tempoj. La kulturo de tiu feŭdisma epoko estis influita de speciala klaso de la popolo. Ekzemple „gagakuo” (kortega muziko) disvastiĝis sub la protekto kaj patroneco de nobeloj; longa „utao” inter samuraĵoj kaj bonzoj. Sed samiseno disvastiĝis ĉiam inter burĝoj kaj ĝi estis uzata por „bunraku” (pupo-ludo) kabuki”, popolkantoj kaj aliaj formoj de amuzoj.

GAGAKUO (Kortega Muziko). La „gagakuo” estis la unua orkestro en Japanujo kaj ekzistas tie dum jarcentoj. La gagaku-orkestro konsistas el lignatubaj instrumentoj, perkutaj instrumentoj kaj kordaj instrumentoj. Gagakuo estis plej populara en la Heian-periodo (800-1200 p.Kr.), kiam ĝi estis la sola amuzajo. Tamen, gagakuo pli kaj pli perdis la favoratecon pro tio, ke aliaj instrumentoj estis enkondukitaj kaj aperis aliaj formoj de muziko, kiuj fariĝis pli popularaj. Sed ĝi pluvivadis sub la protekto de la Imperia Kortego. Hodiaŭ troviĝas ĉ. cent komponoj por gagakuo, sed ĝenerale iliaj melodioj estas monotonaj. Multaj provis miksi gagakuon kun okcidenta muziko, sed ĝi estas tro unika por esti miksitita kun heterogenaj elementoj.

*) En la kadro de la propagando por la 50-a Universala Kongreso de Esperanto en Tokio ni ricevis supran artikolon. Ĉar ĝi ankaŭ el vidpunkto de okcident-orientaj rilatoj estas interesa, ni volonte publikigas ĝin.

Unue la daton: Bonvolu rizervi la tagojn 24-an ĝis 26-an de septembro 1965 por tiu festo.

Ne estis facile trovi taŭgan lokon por tiu okazo, ĉar ni bezonos: grandan salomon por kunveni, bonajn lokojn por manĝi kaj loĝi, se eble en bela ĉirkaŭaĵo kaj laŭ ne tro altaj prezoj.

Ni tamen sukcesis trovi ĝin kaj ni luis la „Internationale School voor Wijsbegeerte” en Amersfoort dum la nomitaj tagoj. Tie ni havos: a. Belan salomon kun loko por 150 ĉeestantoj; b. Grandan salomon por kune manĝi; c. Kelkaj ĉambroj por legi, babili, ripozi, k.t.p.; d. Loĝejon por 70 vizitantoj, kie oni povos loĝi en unu-kaj-dupersonaj ĉambretoj.

Ĉi ĉio sin trovas en bela parko kaj arbara ĉirkaŭaĵo, tiel ke ni povos promeni kaj veturi laŭplaĉe.

Eĉ se anoncos sin pli ol 70 kongresanoj - kaj ni esperegas tion oni povos loĝigi ilin laŭ la samaj kondiĉoj proksime de la centra konstruaĵo.

Kaj nun la provizora programo:

Vendredon vespere: Malferma parolado kaj agrabla kunesto.

Sabatmatene: Prelego de S-ro Prof-D-ro G. Hamming.

Sabatposttagmeze: Ekskurso kun akcepto en iu bela loko.

Sabatvespere: Distra vespero. La programo sekvos.

Dimanĉmatene: Libera tempo por viziti preĝejon, fari promenon aŭ viziti Amersfoort.

Dimanĉposttagmeze: Prelego de iu eksterlanda samideano. Fermo. Post la tagmanĝo: Foriro de la partoprenintoj.

Ni esperas ke vi venos grandnombre por festi nian 60-jaran ekzistadon kaj por ricevi entusiasmon kaj instigon por denove propagandi nian internacian lingvon Esperanton.

La Komitato:

J. R. Janssen, prezidanto;

S-ino Doeve, Sekr.-ino;

W. Rodenhuis, Kasisto.

Manuskriptojn, prefere unuflanke tajpitajn, por iu numero de N.E. ni akceptas ĝis la 10-a de la antaŭa monato.

La redaktoro.

EL LA SEKCIOJ.

Sekcio Groningen.

Sekr.: Johan de Wittstraat 103.

Sabatvesperon, la 12-an de dec. ni festis kune kun la gesamideanoj el Leeuwarden, Veendam kaj Hoogezand la zamenhofan vesperon, organizitan en kunlaboro kun la sekcioj de F.L.E. kaj K.U.N.E.

S-ro Mook, kiu gvidis tiun vesperon povis bonvenigi 69 ĉeestantojn, i.a. memorigante, ke en sept. en la seminarion en Groningen la estro enkondukis Esperanton, kiel fakultativan fakon. F-ino Hovinga instruas Esperanton en la nomita lernejo.

S-ro J. Ph. Punt el Utrecht, konata de la disaŭdigo: „Socialista novaĵo en Esperanto”, dissendita de la V.A.R.A. prelegis pri la signifo de la zamenhoftago kaj pri la uzado de Esperanto en grandaj firmaoj, kiel ekzemple Philips. Plue li laŭ humora maniero traktis laŭliterajn tradukaĵojn de proverboj el 4 fremdaj lingvoj. Feliĉe Esperanto havas propran idiomon, samnivele kiel en naturaj lingvoj.

S-ro J. V. Holleman, nia plej maljuna kaj malnova esperantisto, mallonge, sed bonege prelegis pri la virinoj en la Movado, celanta precipe la edzinon kaj la filinon Lidja de d-ro Zamenhof, kiuj dum sia tuta vivo sindone kaj laboreme dediĉis sin al la disvastigo de Esperanto.

F-ino Hovinga kaj s-roj Moerbeek, Beekhuyzen kaj Kattenbeld ludis kun sukceso 2 teatraĵojn, tradukitajn de f-ino Hovinga el la nederlanda lingvo.

Dezirante al la ĉeestantoj agrablajn festotagojn, s-ro Mook fermis la kunvenon.

Post multe da propagando ni varbis 57 gekursanojn por la skriba kurso en la urba gazeto. Konsiderante nian konkuranton la televidon, ni tamen estas kontentaj. S-ro Mook kaj s-ino De Vries gvidas la kurson kaj korektas la taskojn.

La 10-an de dec. ni havis la unuan kontaktvesperon kun la kursanoj. 26 el ili ĉeestis la kunvenon, organizitan de s-ro Mook. Post bonveniga parolo ĉi tiu instruis al la lernantoj kaj priparolis la plej oftajn erarojn.

Kun intereso la kursanoj sekvis la lecionon kaj ofte demandis ion rilate al la lecionoj.

N.C.K.-v. G.

Sekcio Haarlem.

Sekr.: Ruys de Perezlaan 2.

Decembro estas eksterordinara monato en la jaro kaj ankaŭ en la klubvivo. Ni kunvenis du fojojn kaj ambaŭfoje estis eksterordinara kunveno.

La 3an de decembro ni festis nian Sankta-Nikokao-vesperon. Inter la ĉeestantoj ni vidis nian honoran membron s-ro Henskes, kiu nun loĝas en Hago. Estis amuzaj surprizoj, kiel ekz. la nigra kato, kiun nia prezidanto ricevis.

La dua vespero estis la Zamenhofa vespero. Estis tre sukcesplena vespero kaj multaj samideanoj vizitis ĝin. Eĉ el Leiden ni vidis kelkajn amikojn.

S-ro Prago de la Amsterdama Universitato interese rakontis pri sia antaŭa patrujo: Rumanio. Li unue pritraktis la situacion antaŭ la militoj kaj poste tiun post la militoj.

La legacio de la Rumana Popolrespubliko pruntedonis al ni belajn artikolojn por ekspozicii. Ni vidis bele broditajn bluzojn, jakojn, teksitajn tukojn, broditajn ŝalojn, vazojn, lignajn telerojn, kiuj estis lignogravuritaj k.t.p. Sur la muroj de la salono pendis grandaj fotoj de la tuta lando.

Antaŭ la paŭzo s-ino Marmeborg ludis pianon kaj dum la paŭzo la libroservo faris sian eblon vendi kiel eble plej multajn librojn. Post la paŭzo s-ro Elskamp, (kiel gvidanto), ges-oj Doeve kaj s-ino Rodenhuis kantis kvarope Rumanan kanton, tradukitan de Andreo Ĉe, Jidan kanton kaj Germanan kanton. S-ro Kwantes montris la tri filmojn, kiujn la Legacio pruntedonis ankaŭ al ni.

1. Pri la montaro Ia Karpatoj, 2. Pri Popoldancoj kaj 3. Pri la pelikanoj en la delto de la Danubo.

Sekcio Hilversum.

Sekr.: Jonkerweg 11.

Ni organizis Zamenhof-vesperon en kunlaboro kun F.L.E. kaj tiel sukcesis kunigi pr. 20 ĉeestantojn. Nia prezidanto, s-ro A. Put, diris kelkajn vortojn por enkonduki la prelegon de f-ino Burger el

ĜIU VARBU NOVAN ANON EN 1965

Zeist pri Israelo kaj komparis Zamenhof kun Th. Herzl. Poste la prelegantino interese kaj entuziasme rakontis pri la mirakla lando, montrante multajn belegajn diapozitivajn. Estis altnivela vespero, pri kiu ni ĉiuj estis tre kontentaj.

Sekcio Leiden.

Sekr.: Nassaulaan 30, Oegstgeest.

La sekcio Leiden organizis gazetkurson en „De Leidse Post”. La rezultato ĝis 1-1-1965 estas: 82 partoprenantoj. La gvidanto estas s-ro Valkenburg.

Sekcio Zaandam.

Sekr.: P. L. Takstraat 64.

Iom ĝoje ni povas raporti ke preskaŭ la triono de nia membraro partoprenis la Zamenhofan kunvenon Zaanlandan okazintan en la proksima esperanto societo en Wormerveer. Ni vidis tie membrojn kiujn ni malofte vidas en niaj kunvenoj. Ni nun esperas ke pli ol la duobla kvanto da membroj vizitos nian estontan prelegkunvenon kiu okazos vendredvesperon la 26-an de februaro je la oka horo en „De Harmonie”, Rustenburg 71 C. Prelegos nia hinda samideano Aŝvini-Kumar.

La estraro.

Sekcio Zeist.

Sekr.: Fred. Hendriklaan 31.

Nia sekcio memorigis la naskiĝon de D-ro L. L. Zamenhof per seriozaĵoj kaj fantaziaĵoj.

Antaŭ la paŭzo oni ĝuis prelegon (S-ro Lootsma) kaj deklamadojn (S-ino W. Wijnen kaj F-ino Wijnands).

Post la paŭzo la sfero en la salono estis tute alia. Iu senmaskigis sin kiel iluziisto kaj poste kiel „quiz” gvidanto.

La komuna ludo inter kvardek ĉeestantoj havigis al ĉiuj multajn ridadon kaj gajecojn.

Rimarkinda estis la cirkonstanco, ke tiun vesperon la nombro da gejunuloj estis samgranda kiel tiu da pliaĝuloj.

NOVJARA BANKEDO SUB GVIDADO de H.E.K.K. Hago.

Nia novjarbankedo okazis la 7-an de januaro pasinta en „Paviljoen Gemeentemuseum” kaj ĝi fariĝis renkontiĝo en tre agrabla etoso.

Cirkaŭ la belaj per floroj kaj kandeloj ornamitaj tabloj ni kune manĝis. Ĉi tiu manĝado estis de tempo al tempo interrompita de kelkaj parolantoj, kiuj tiamaniere plialtigis la festan ĉeeston. Unue, S-ro Vernooy, prezidanto de H.E.K.K. bonvenigis la ĉeestantojn kaj deziris ĉion bonan por la nova jaro al la gastoj kaj samtempe esprimis sian bedaŭron pri la neĉeesto de la anoj el aliaj unuiĝoj en Hago. Poste li enkondukis Fr-inon E. Otto kiu deklamis al ni ĉarman novjarsaluton el Ĉeĥoslovakujo.

S-ro Bloemhard rakontis al ni amuzan historieton okazintan en koncertejo, kiam li devis kunlabori al la fifama Birmafervojo. S-ro Borsboom opiniis, ke bankedo ludas gravan rolon por interkontakti kaj por la parolado kaj uzado de Esperanto. Li esperis, ke HEKK ĉiujare organizos bankedon, ĉar ĝi havos por la Esperanto-sfero gravan funkcion.

S-ro Jung, kiel kutime, surprizis nin per spritaj rakontoj kaj rememorigis pri du gravaj Esperantaj aferoj dum la pasinta jaro, nome la 49-a Universala Kongreso de Esperanto kaj la fondo de F.E.N.

Ĉe la fino de la bankedo, S-ro Vernooy fermis la gajan vesperon kaj dankis la gastojn pro ilia ĉeesto.

N. Bras-Bakker,

Sekretariino de H.E.K.K.

ESPERANTISTA KULTURDOMO KASTELO „GRÉSILLON”

Baugé (Maine et Loire), Francujo.

Programo de Kulturaj Aranĝoj en 1965.

1. 9—16 aprilo:
Kultura Semajno, i.a. kunlaboras mag. S. Pragano. (vidu sube)
2. 4—25 julio:
Preparado de tri ekzamenoj.
3. 25 julio — 8 aŭgusto:
Internaciaj Turismaj kaj Kulturaj Fervoj. Prelegoj, filmoj, dancoj, ekskursoj.
4. 8—29 aŭgusto:
Kulturaj Esperantistaj Semajnoj.
5. 29 aŭgusto — 12 septembro:
Studperiodo, organizita de U.E.F.

Informoj haveblaj ĉe supre menciita adreso.

4-a INTERNACIA KULTURA SEMAJNO EN „GRESILLON”.

La 4-a Paska Kultura Semajno, sub la aŭspicioj de la Ministro pri Franca Edukado, okazos de la 7-a ĝis la 16-a de aprilo 1965 en la kastelo „Grésillon” - Baugé (Maine-et-Loire).

Eminentaj esperantistoj prelegos pri diversaj temoj, precipe kulturaj, kaj praktikaj kursoj, ludoj, distraj vesperoj okazos dum tiu semajno.

Petu klarigojn pri la kosto de la restado kaj pri rabatiloj por la fervojoj ĉe supre menciita adreso.

EUROPA ESPERANTO-KONFERENCO 1965 VIENO - AUSTRUJO.

Tiujn esperantistojn, kiuj intencas partopreni la Konferencon aŭ kiuj ankoraŭ ne havas fiksitan planon por sia libertempo en la venonta somero, ni atentigas je la artikoloj pri komuna vojaĝo al Vieno kaj returne, aperintaj en la numeroj decembro 1964 kaj januaro 1965 de Nederlanda Esperantisto.

La Unua Bulteno-n kun aliĝilo oni povas peti ĉe la Organiza Komitato de E.E.K.-1965, p/a Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausegasse 16, Wien XV, Aŭstrujo, aŭ ĉe: J. Th. de Goeij, Deensestraat 58c, Rotterdam-7, kiu respondos ankaŭ eventualajn demandojn pri la komuna vojaĝo.

La „Internacia Akademio de la Turismo” oficiale enketas pri Esperanto.

La „Internacia Akademio de la Turismo”, patronata de la Princo Rainier III. de Monako, havis lastatempe sian Ĝeneralan Kunvenon en la svisa urbo Lausanne. La Konsilantaro de la Akademio ekzamenis kaj diskutis proponon rilate al „Esperanto” kaj decidis komisi d-ron Hj. Unger en Zŭrich, fari internacian enketon kaj postan raporton pri la praktika uzado de Esperanto en la tutmonda turisma sfero, kaj prezenti proponon pri eventuala adopto de Esperanto en la Internacia Faka Vortaro de la Turisma Akademio.

D-ro Hj. Unger (en Zŭrich 22, Svislando) estas Prezidanto de la „Svisa Unuiĝo de la Turismo-jurnalisto” kaj ĉefredaktoro de la germanlingva turista revuo „Welt auf Reisen”.

TRA LA LIBRARO.

LA DELTO-PLANO. Broŝuro, eldonita de la „Sekcio Informado” de la Ministerio de Trafiko kaj Akvostato en kunlaboro kun la Delfo-Servo de la Regna Akvostato. Ellaborita de la Regna Informa Servo. Junio 1963. 21½ x 15 cm., 15 pĝ. Havebla ĉe Staatsdrukkerij- en Uitgeversbedrijf, 's-Gravenhage. Poŝtĝir-konto 42 53 00. Prezo gld. 0,65.

Tiu ĉi broŝuro donas bonan superrigardon pri la giganta laboro por protekti S.-O.-Nederlandon. La multaj ilustraĵoj kaj klarigaj mapoj estas tre instruaj. La broŝuro i.a. tre taŭgas por esti uzata dum geografiaj lecionoj pri nia lando. Ni esperas, ke oni multe aĉetos kaj sendos ĝin al eksterlandaj konatoj.

JARLIBRO DE U.E.A. 1965 DUA PARTO

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam. 128 paĝoj. „Nur por uzo de membroj”.

Kontraŭe al la kutimo de la lastaj jaroj, ĉi tiu dua parto ne havas kiel aldonon terminaron pri ia fako aŭ pri ia speciala temo. La pli granda parto konsistas el jam presita aldono al la kongresdokumentoj de la U.K. en Hago: Raporto de la Estraro; Raporto pri la agado de C.E.D. kaj Raporto de Landaj, Fakaj kaj Neneŭtralaj Asocioj. La tie forlasita raporto „Periodaĵoj B” pri „Monda Kulturo” nun estas enŝovita. Aldonitaj estas la diversaj financaj dokumentoj.

La tuto donas ampleksan superrigardon super la laboro de U.E.A., ĝia kresko dum la lasta jaro, respegulita en kresko de la nombro da oficistoj en la Centra Oficejo. Nun jam konsiderinda kvanto! Ĉar la raportoj rilatas al la agadoj en la periodo inter la 1-a de aprilo 1963 kaj la 1-a de aprilo 1964, kelkaj informoj ne plu estas aktualaj. Ĉar temas pri „dua parto 1964”, oni supozus trovi en ĝi kelkajn sciigojn pri la rezultoj de la ĵus pasinta kongreso kaj pri la aktiveco rilate al la „Petskribo”. Almenaŭ pli detale ol menciis la direktorino en la Antaŭparolo. Ĉu ne estas eble fari tion en ia aldono? La detala priskribo de la rezultoj de la antaŭjara kongreso, kvankam interesa kaj grava, fariĝas jam preskaŭ antikvaĵa en tiu ĉi hasta tempo.

La du partoj kiel tuto estas impona ver-

ko, tiel spegulante la tutmondecon de nia movado, ke oni dezirus, ke ĉiu Esperantisto, kaj ne nur la individuaj membroj de U.E.A., havu okazon tralegi ĝin por povi ĉerpi el ĝi novan entuziasmon por daŭrigi sian sanktan vojon.

R. S.

KAŬZOJ DE MILITO. Referato de mag. J. W. Nobel, kunlaboranto de Polemologia Instituto, en la 43-a Kongreso de Asocio de Laboristoj Esperantistoj F.L.E. je la 21-a-22-a de marto 1964-a en Groningen. Havebla ĉe la Libroservo de F.L.E., Marnixstraat 57, Haarlem. Ĝirk.: 11 12 78. Prezo: Dek ekz. por gld. 1,—.

La Polemologia Instituto en Groningen sub gvidado de prof. Rölting estas preskaŭ unika en la mondo. El la broŝuro ni povas ekhavi bonan ideon pri la labormetodo de la instituto, kiu celas science pristudi la fenomenon de milito. Tiu scienco estas nomata „polemologio” (la greka vorto „polemos” signifas „militon”).

La verkinto pritraktas diversajn kaŭzojn, i.a. li mencias „nescion”: reciproka nescio de landoj kaj la enloĝantoj. Laŭ ni Esperanto povas ĉi tie kontribui al pli bona interkompreno kaj forigo de tiu nescio.

Interesa eldono por personoj, kiuj ŝatas sciencan pritrakton de temo. Estas bedaŭrinde, ke en Esperanto ofte aperas tiaj broŝuraj eldonoj, kiuj post iom da tempo estas malfacile troveblaj. Estus dezirinde presigi valorajn samtemajn verkajojn en unu pli impona kolekta volumo.

H. G.

Turisma broŝuro pri Olomouc (Ĉeĥoslovakujo). Bone ilustrita broŝuro, jam aperinta en 1959. Ni ricevis ĝin samtempe kun invitilo en naŭ lingvoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto, al la 5-a tutŝtata ekspozicio de ornama ĝardenkulturo en Olomouc de 15.VIII - 6.IX.1964.

Bedaŭrinde tro malfrue por ankoraŭ aperigi la informon en la julia-aŭgusta numero de „N.E.” Cetero imitinda agado: uzo de Esperanto en multlingva informo. La broŝuro estas havebla ĉe: Turista-Ĉedok, Placo de Stalin kaj Strato 28, OLOMOUC, Ĉeĥoslovakujo.

LINGVAJ PROBLEMOJ.

21. Esperanto-ekzamenoj.

La presota materialo por la januara n-ro de „N.E.” estis tiom abunda, ke ĝi devis aperi 12-paĝa. Tial la februara n-ro aperu nepre nur 8-paĝa. La sekvo estos, ke ne estos loko en ĝi por mia rubriko „L.Pr.”.

Nu, estas ankoraŭ 2 ekzamenaj taskoj, super kiuj la gelegontoj povos lingve problemi.

En 1964 jam aperis la taskoj E1 kaj 2 kaj M1 kaj 2 kaj ĉi-sube sekvas S1 kaj 2.

Eble pluraj gelegontoj ne komprenos tiujn literojn kaj numerojn. Tial mi solvu per kelkaj linioj almenaŭ tiun problemon.

Antaŭe oni povis akiri 2 Esperanto-diplomojn: A (por lingva lerteco) kaj B (por instrua kapableco).

La lastajn jarojn ni havas 3 diplomojn: diplomo E (elementa: por lingva lerteco); diplomo M (meza: malpli simpla) kaj diplomo S (supera: plej altgrada scio). Por ĉiu ekzameno oni devas fari 2 traduktasojn: 1: el Esp. en la nederlandan lingvon; 2: el la nederlanda en Esperanton.

Krome estas ankoraŭ ekzameno por „Esperanto-akte l.o.” (instrua kapableco)

Pluajn informojn pri postuloj laŭ peto donos nia sekretariino: s-ino W. P. Lokvan Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z).

S. S. de Jong Dzn.

ALGEMENE NEDERLANDSE ESPERANTO-EXAMEN-COMMISSIE.

S1. Amersfoort, 16 mei 1964.

Ter vertaling. Tijd 2 uren.

Parto el: Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof.

de Prof. D-ro E. A. Bokarev (Sovetunio).

Sed detale tuŝi tiun sociologian flankon de la problemo ne estas celo de tiu ĉi artikolo. Ĝia celo estas iom trakti pure lingvan demandon, nome, kiuj lingvaj trajtoj de Esperanto ebligis al ĝi fariĝi instrumento de interkompreniĝo kaj superi tiurilate siajn konkurantojn. La reprezentantoj de aliaj sistemoj de lingvo internacia precipe atentis en siaj teoriaj rezonadoj ne tiujn trajtojn, kiuj karakterizas lingvon internacian kiel instrumenton kaj esprimsistemon, sed tiujn, kiuj

reprezentas iun teorian principon, tute ne plej gravan de praktika, funkcia vidpunkto.

Por la t.n. naturalistoj*), adeptoj de Occidental, Interlingua k.t.p. ekzemple, kiuj ĉiam plej atentis la etimologian flankon de la problemo, sistemeco kaj strukturo de lingvo internacia restis afero duagrada, iafoje eĉ de nula graveco. Ili ĉiam diskutis pri kriterioj kaj gradoj de natureco: ĉu estu atentata nur ĝenerala vortfonduso aŭ ankaŭ scienca terminaro, ĉu estu atentata nombro da lingvoj aŭ nombro da parolantoj, ĉu estu atentataj nur modernaj lingvoj aŭ ankaŭ la greka kaj latina, ĉu estu atentataj nur romidaj lingvoj aŭ ankaŭ iuj aliaj k.t.p. La naturalistoj, atentante unuavice la similecon de internacia lingvo al la naturaj, similas homojn, kiuj penas taksi iun sistemon de aeroplano ne laŭ ĝiaj teknikaj, strukturaj kvalitoj, sed laŭ grado de ĝia simileco al natura birdo. Ofte impresas, ke adeptoj de iuj lingvoprojektoj, diskutante pri diversaj temoj de lingva teorio, tute forgesas, por kio iliaj lingvoj estas kreaĵaj, ĉu por esti kabinetaj etimologiaj sistemoj, ĉu por esti praktikaj rimedoj de internacia interkompreniĝo.

Kiuj do trajtoj de lingvo estas plej gravaj, se ni atentus ĝin kiel praktikan rimedon, respondante al koncernaj postuloj de socia praktiko? Internacieco de lingva materialo estas tre grava en lingvo internacia, sed ĝi devas esti subigita al tiuj esencaj trajtoj de lingvo, kiuj karakterizas ĝin kiel rimedon de interkompreno: aŭtonomeco de lingva sistemo, integra kohereco de ĝiaj elementoj kaj regulco-analogeco de ilia funkciado. Nur tio faras lingvon plej manovrebla kaj esprimkapabla en internacia interkompreno.

El la „Memorlibro pri la Zamenhof-jaro”.

*) Vertaal: naturalisten.

anoncu en **n.e.** a
noncu en **n.e.** an
oncu en **n.e.** ano
ncu en **n.e.** anon
cu en **n.e.** anonc
u en **n.e.** anoncu

S2.

Ter vertaling. Tijd: 10-12 uur.

Wie is de koning der dieren?

Wanneer wij over de koning der dieren spreken, bedoelen wij gewoonlijk de leeuw. En het kan niet worden ontkend, dat hij de koning van de vlakten, de heerser over de open velden is. Maar in het ondoordringbare oerwoud, in de doornstruiken en op de ontoegankelijke bergpassen heerst een andere koning. Dat is de olifant, een achterneef van de voorhistorische mammoet, een reus van zes- of zeventuizend kilogram met al de onverbiddelijke eigenschappen van een moderne tank. In tegenstelling tot de leeuw is hij een vegetariër en hoeft niet te doden om zijn dagelijks rantsoen te bemachtigen. Wee het dier, dat het hem in zijn domein lastig maakt. De woeste buffel is geen partij voor hem en zelfs de vechtlustige neushoorn, die altijd en overal ruzie zoekt, blijft vol respect uit zijn nabijheid. In het duister van het oerwoud is de olifant de onbetwiste alleenheerser. In het grijze verleden moet de bepantsering van de olifant ondoordringbaar zijn geweest. Maar toen kwam de moderne mens met zijn kogels en zijn kruut. Hij leerde, hoe hij het spoor van de reus moest volgen. Hoe hij uur na uur en kilometer na kilometer voort moest sluipen om tenslotte de rustplaats te vinden, waar het dier beschutting zoekt tegen de hitte van de middagzon. En daar, midden in het bos, speelde zich dan de laatste akte af van het drama, dat de dood betekende voor een van beiden. Want zelfs het best geplaatste schot en het modernste wapen doden een olifant niet gemakkelijk en een gewonde olifant is in zijn woede het gevaarlijkste dier op aarde.

De haat, waarmee het dier zich tegen de jager keert, is begrijpelijk. In onze begeerte naar geld en ivoor zijn wij het geweest, die de olifant uit zijn schaduwrijke bossen verdreven en hem dwongen in het duister naar rivieren en andere drinkplaatsen te zoeken. Hij doorzag zijn listen en vond een antwoord op de uitdaging door op meesterlijke wijze steeds van tactiek te veranderen, door snel te vluchten, als het nodig was, en door met niets onziende heftigheid aan te vallen, als er geen andere mogelijkheid overbleef.

Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia”

Pres.: S-ro H. M. Schippers, Van Humboldtstraat 60, Utrecht.

Sekr.: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Kasistino: F-ino P. Oosthoek, Bree 49 a, Rotterdam-25.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de la unuiĝo.

Libroservo: Borniastraat 95, Leeuwarden. Poŝtĝirkonto: 7 69 15.

Biblioteko: S-ro J. R. Janssen, Rijperweg 12, Bloemendaal.

Tel.: 0 25 00 - 5 11 20.

Gazetarservo: Frederikslaan 47, Schoorl (N.-H.).

Anoncoj: Anonctarifoj laŭ peto haveblaj ĉe la kasistino.

Informa Fakoj: S-ino H. J. Woessink-Boet, Vondellaan 47, Arnhem.

Tel.: 0 83 00 - 2 12 56.

KONCIZE

Renkontkunvenoj por gejunuloj en Anne Frank-Domo.

Sekve de interparoladoj inter la Anne Frank-Fondaĵo kaj la International Friendship League (Internacia Amikeco-Ligo) okazos en 1965-a en la Anne Frank-Domo kunvenoj por gejunuloj („instuiven”). Ankaŭ T.E.J.O. partoprenis la postajn preparojn. Ĉiuj junaj interesiĝintoj estas bonvenaj. Petu informojn ĉe Anne Frank-Domo, Prinsengracht 263, Amsterdam.

Tel.: 0 20 - 24 28 37 aŭ 24 10 97.

Skolta Movado kaj Esperanto.

„Vijf”, informilo pri Esperanto por nederlandaj skoltoj, ĉesis aperi. Unu el la kialoj estas, ke la redaktoro s-ro J. K. Hammer iĝis ĝenerala sekretario de la internacia Esperanto-asocio por skoltoj: S.E.L. Grava kaj temporaba funkcio!

Per „Vijf” Esperanto nun konatiĝis ĉe skoltoj tra la tuta lando.

Por personoj, kiuj volas subteni S.E.L. (Skolta Esperantista Ligo) ni citas la adreson de la reprezentanto en Nederlando: S-ro J. K. Hammer, Wibautstraat 33, ZAANDAM. Jarkontribuo: gld. 4,— Ĝirkonto: 63 22 46 je la nomo de s-ro Hammer.

ĈU VI INTENCAS VIZITI ĈEĤOSLOVAKUJON? - Ĉiujare kreskas la nombro da eksterlandaj vizitantoj al Ĉeĥoslovakujo kaj al ĝia ĉefurbo Prago. La

vizitantojn esperantistajn certe interesos, ke ili povos peti gvidiston tra Prago parolantan Esperanton. En tiu ĉi kazo la esperantistoj turnu sin al vojaĝagentejo ĈEDOK, Praha 1., Na prikopě 18, Ĉeĥoslovakio, kiu tian gvidiston disponigos. **GVIDLIBRO PRAHA** estis eldonita en la jaro 1961-a, ilustrita kaj kun mapo de la urbo.

Jana Cichová.

Ferio-elŝanĝo.

Profesorino, kiu havas 10-jaran filineton, surbaze de reciprokeco bonvenigus dum la venonta somera ferio ĝis 3-4 semajnoj similaĝan filineton el Nederlando, Svedujo aŭ Aŭstrio. Respondon petas: Kolár Sándorné, BUDAPEST XIV, Kalaács-u. 9/a, Hungario.

Filatelio.

Filatela Sekcio de Pola Esperanto-Asocio sciigis al s-ro F. J. Bergman, Hooft Graaflandstraat 29, Utrecht, ke ĝi havas intereson pri poŝtmarkoj kun nederlandaj Esperanto-stampoj. Kiu volos interŝanĝi, skribu al s-ro Bergman.

Kolektado. La organizaĵo EKIK (Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Klubo) jam dum 10 jaroj servas al siaj membroj per gazeto, poŝtŝtampa katalogo, glumar-ka banko k.a. Adreso: S-ro J. Paulson, Algatan 3, SOLNA 2, Svedujo (laŭ „Esperanto” nov. 1964).